EKO 2016-11 sendita el Budapeŝto la 12an de aprilo.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

# AMO atingas landon centre en la mondaj novaĵoj

Efektive, temas pri azia seminario – la tria en kvin semajnoj, ĉar Urgupo troviĝas firme en la azia parto de Turkio. La kialoj por la nuna elstarigo de tiu lando en la mondaj komunikiloj estas spegulitaj en la sekvaj rekomendoj. La teksto, sendita de Renato Corsetti, restas kun la origina vortumo:

## Rezultoj de la 23-a AMO-seminario en Urgupo, Turkujo

de la 1-a ĝis la 5-a de aprilo 2016

La dudek kvar partoprenantoj el sep landoj el 3 kontinentoj estis informitaj pri la stato de la movado en la regiono Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA) kaj debatis pri la maniero plibonigi ĝin. Fine ili formulis la ĉi-sekvajn rekomendojn:

- **Rilate al la movado en Turkujo**

Ili detale informiĝis pri la agadoj nuntempe farataj en kelkaj partoj de Turkujo (ĉeestaj kaj retaj kursoj, eldonan kaj redaktan agadon, informado pere de la reto, ktp.), kiuj certe superas tiun de pluraj landoj kun formale ekzistantaj landaj asocioj. La partoprenintoj rekomendas ke tiuj agadoj estu daŭrigataj kaj ke la komisiono MONA de UEA subtenu ilin, se necese, finance kaj alimaniere.



- **Rilate al la movado en arablingvaj landoj**

Oni detale diskutis pri la (malbona) situacio en la unuopaj arablingvaj landoj. Notinte la kelkajn pozitivajn ekevoluetojn en kelkaj el tiuj landoj, la partoprenantoj decidis ke oni multe pli utiligu la reton por informado. Saed Abbasi, iranano parolanta la araban, kunlaboros kun la komisiono MONA por plibeligi la nun ekzistantan arablingvan retan paĝon.

- **Rilate al informiloj por arablingvanoj**

Oni multe diskutis pri la maniero fari pli bonajn informilojn por arablingvanoj kaj pri la ideoj substrekindaj en tiuj informiloj. Oni konkludis, ke prefere Esperanto prezentiĝu ne kiel io eŭropa sed kiel io, kio venas el ekster Eŭropo, prefere el Azio, kiel propono por kunlabori inter malsamaj civilizoj. Aparta propono pri tio, jam redaktita, estos siatempe prezentata al la komitato de UEA.

- **Rilate al la problemo de rifuĝintoj**

La problemo de rifuĝintoj estas tre preme sentata en ĉi tiu mondoparto. La partoprenantoj vaste diskutis pri la iniciatoj farataj aŭ proponataj de esperantistoj tra la mondo. Ili formulis rekomendon al la estraro de UEA laŭ kiu UEA gvidu la agadon kaj interkonsentu kun la Agentejo de UN, UNHCR, por kursoj pri Esperanto en la tendaroj kiel propedeŭtika lingvo  por tiuj, kiuj ankoraŭ ne havas difinitan cellandon.

Urgupo, 2016-04-05

## Fokuso al la lando de nia plej juna Landa Asocio

Post enkonduko kaj klarigo pri la koncepto pri FLAM-analizo, gvidis la programon Ilia Dewi pri la temo 'Perspektivoj por Indonezio kaj Sudorienta Azio'. Kune kun la indonezianoj Oki kaj Eko, ŝi donis informojn pri la agado en tri urboj:

**Ĝakarto kaj apudaĵoj**

Malfacilas kunveni, multaj loĝas en antaŭurboj, kun vojaĝtempo de meze 90 minutoj unudirekte. Kutime oni kunsidas en magazeno, je la 17.00h. Tiu klubo 'Esperiga Suno' ekzistas de ses jaroj kaj havas regulajn monatajn kunvenojn. Raportis Eko:  En strataj manifestacioj malfacilas konvinki homojn pri Eo: 'Sufiĉas la angla'.  Eko okazigas kursojn en komunumo trilingva (Pakta bahasa). Tiuj lingvo-amantoj volonte aŭdas pri Eo. Eble milo aŭdis pri Eo en tiu rondo.

**Jog-Jakarto**

Oki raportis: 4-5 studentoj kunvenas neregule en universitato en Jog-Jakarto, inter ili fluaj parolantoj. Ne estas klubo. Vizitas eksterlandaj esperantistoj reage al informoj en Fejsbuko. Dum kunvenoj oni faras konigajn agojn, ekzemple en kafejo. Volas kreskigi la grupon. Hispana e-isto studas ses monatojn en la universitato, sed tio baldaŭ venos al fino.  Uzas FB (havas grupon) kaj WhatsApp ks. Ekzistas 'amikoj de la grupo'. Diskutoj kiel fari pli grandskalajn varbadojn, surstrate aŭ en la universitato. Historie (en la 60aj jaroj) funkciis klubo.




**Bandung**

Plejparte aktivas studentoj de la sunda universitato, kiuj havas bonajn rilatojn kun la muzeo pri Azia-Afrika Kunlaboro, kie ili funkciigas la klubon 'Ruĝa Formiko'. Oni okazigas kurson ĉiujare, pere de la muzeo, unuavice por membroj de la societo 'Amikoj de la Muzeo'.  Kiu finstudis unujaran kurson devas en la dua jaro jam fariĝi gvidanto. Malfacilas havi interparolojn kun eksterlandanoj. Esperantistoj dum la trilanda kongreso partoprenis en la festado 'Nokto de la Muzeo' kun muziko kaj

distra programo. La muzeo kaj la esperantistoj duone/duone kontribuis finance por realigi la eventon. Esperantistoj pretigis afiŝojn; la muzeo permesis pendigi ilin stratrande. Koncerto de Jonny M. en muzea balkono altiris bonan publikon, kaj ene de la muzeo kaj en la tujapuda strato.

Indonezianoj tenas kontaktojn kun la mondo pere de grupoj en Fejsbuko, WhatsApp, Instagram.

***Dianne Lukes (Aŭstralio)***

Agado Espero celas aktivajn esperantistojn. La celo estas penetri bazajn ŝtatajn lernejojn, kie instruistoj jam havas instrurajton kaj kapablon. Ilo estas la libro 'Esperanto' de la samlandano Penny Vos kiu prezentas la lingvon al instruistoj. La celo estas persvadi ilin interesiĝi pri Esperanto kaj voli ekinstrui ĝin. Kiam ekstera esperantisto gvidas kurson, tio kutime okazas tra 45 minutoj semajne – nesufiĉa por efika lingvo-instruado. La angla versio celas aŭstraliajn instruistojn, ekzistas ankaŭ pure Esperanta versio, kiel bazo por traduko al pliaj lingvoj kaj situacioj. Ekzistas en elektronika formo franca versio. Estas planoj malfermi la projekton tra multaj landoj kaj en landoj kun limigita pagipovo disponigi la materialon senpage en elektronika formo.

***Forumo:***

Bradley MacDonald skizis la agadon en Nov-Zelando, kie malfacilas veki entuziasmon kaj organizi kongresojn enlande. La gvidantoj en tri minutoj resumis siajn sesiojn. Markus Gabor entuziasmas pri kursfinaj atestiloj kaj citis kazon pri la praktika uzo de atestilo, surbaze de kiu kursano ricevis subvencion de sia universitato. Pluraj emfazis la gravecon uzi Skajpon aŭ similon por parolekzercigo jam frue kaj kontinue en kursoj.




Lee Jungkee (sur la foto) rakontis pri ĉiusemajnaj interkursanaj retbabiloj, inter Hungario (2ptm), kaj Koreio (10 ptm); okazas simile inter Koreio-Japanio-Indonezio. Emfazindas en Azio la lernfaciliga efiko, ĉefe por lerni aliajn eŭropajn lingvojn. Eĉ studinte plurjare ekz. la anglan, pere de Esperanto oni pli klare ekkomprenas la anglajn gramatikon, strukturon ks.

Eblo uzi Eo-kontaktojn por povi lerni alian azian lingvon de denaskula instruisto. Aŭstralia ekzemplo: instrui anglan al enmigrintoj pere de Eo; ekkoni lingvolernajn retkursojn. En estontaj kongresoj kaj seminarioj, oni proponu praktikajn sesiojn, kiel uzi nekonatajn programojn aŭ pli bone uzi duonkonatajn. Kapabluloj certe pretas montri eblojn al malpli kapablaj dum kongresoj.

La rekomendoj de la AMO-seminario estis jam dissenditaj al la ricevantoj de la EKO-komunikoj. Ni ripetas ilin dekstre.

**Rekomendoj de la 21a Seminario de Aktivula Maturigo (AMO) en Bandung, Indonezio inter la 24a kaj la 27a de marto 2016**

1. Ripetu la plurlandan kongresan modelon en la Sudorientazia regiono.
2. Landaj Asocioj de UEA aktivu en landaj filioj de UN, Unesko kaj lingvodefendaj asocioj.
3. Organizu aŭ partoprenu en lingvaj aŭ multkulturaj festivaloj.
4. Starigu ie en Sudorienta Azio bibliotekon kun regionaj verkoj kaj skaneblo.
5. Esperantistoj membru kaj aktivu en kulturaj kaj prilingvaj asocioj.
6. Kreskigu stipendiojn por junaj volontuloj – tiuj ofte havas tempon sed ne monon.
7. Sekvu la lernejan agadon multlandan laŭ la modelo Penny Vos kaj Dianne Lukes.
8. Esperantistoj aĉetu kaj portu T-ĉemizojn kun la vorto 'Esperanto'.
9. En kursoj, eluzu modernajn teknikajn rimedojn por ebligi al lernantoj frue kaj regule konversacii kun studantoj en aliaj landoj kaj kulturoj.

## La unuaj semoj plantitaj

La kvarpersona komisiono por la nova projekto de UEA 'Ni semas' anoncis la unuan aljuĝon. Ricevos la sumon de €100 la projekton 'Lernmaterialoj por mezlernejo por orfoj' en la regiono Rutŝuru, en la nordorienta parto de DR Kongo. La komisiono, konsistanta el kvar konsilianoj, anoncas, ke la sekva konkurso havos limdaton de la 30a de junio 2016. Informoj pri la projekto kaj elŝutebla petilo:

http://aktivulo.net.mastertest.ru/ni-semas

Poste tiu retejo fariĝos parto de pli ampleksa retejo pri la aktivadoj ene de UEA.

La suba foto montras lernejan agadon en la regiono de Ruŝuru kaj Kivu.




Vortoj 1200

## AMO survojas al jubileo

La 22a seminario okazis en Pesaro, Italio en la paska semajnfino. La 24a okazos kadre de la dana kongreso, post kvar tagoj. Restas interesa demando, kiu seminario ricevos la honorkronon pro okazigo de la jubilea 25a seminario. Atendu la sekvan komunikon!

***Korektoj por EKO 10:*** La E-centro en Koreio estas SEK (Seula Eo-Kulturcentro). Al la loĝlandoj de seminarianoj en Bandung, bv. aldoni Nov-Kaledonion.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF farita deNuance Power PDF.